

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013
2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj
Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-41 sendita el Budapeŝto la 25an de septembro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Belartaj Konkursoj anoncitaj virtuale kaj revue

La 19-an de septembro la Komisiono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK) diskonigis la rezultojn de la 72-a okazigo en premifesto elsendita pere de la kanalo de UEA ĉe YouTube, UEA viva. La BK-feston kungvidis Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek) kaj Miguel Fernández, respektive Sekretario kaj Prezidanto de la Belartaj Konkursoj. En la BK partoprenis absolute rekorda nombro de **186 verkoj** el la 5 kontinentoj.

Miguel Fernández anoncis la aperon de la libro *Ĉiuj steloj etas nokte* (katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9877), antologio de mikronoveloj partoprenintaj en la Belartaj Konkursoj. Krome li deklamis la poemon *Soneto de la Lumturo*, de Suso Moinhos, el la libro *Laminarioj*. La poemon *Fratinoj*, de Kris Williams (Ungar) deklamis Sara Spanò. La BK-feston ornamis 3 kantoj: *Ekas la nokto*, kies teksto ricevis la unuan premion en la branĉo Kantoteksto, kaj estis muzikigita de Liven Dek kaj orkestrita de Antero Ávila; *Bela rev'*, kies teksto ricevis honoran mencion en la branĉo Kantoteksto kaj estis muzikigita de Kajto; kaj *Venu al la kisoj*, de Miguel Fernández kaj Viktoro Solé. La videon fermis fota prezento de pluraj el la aŭtoroj de la mikronoveloj konsistigantaj la kolekton *Ĉiuj steloj etas nokte*.

La Premia Festo de la Belartaj Konkursoj de UEA 2021 re-spekteblas en UEA viva: youtu.be/NE1Ye1eh6o4.

Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj



Helpantoj:
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
Francois
Lo Jacomo

- ENHAVO**
- Belartaj Konkursoj
 - UEA malcentrigas sin
 - Eŭropa agado elanas
 - AMO 76 rezultoj
 - AMO 80 subtemoj

Plenaj rezultoj aperis en la oktobra numero de revuo *Esperanto*, sur p. 209 kun alvoko por BK 2022 sur p. 208. Pliaj raportoj aperis en 'La Kolombo de Paco', numero 22, por ke ankaŭ nemembroj de UEA ricevu la rezultojn.



UEA malcentras sin per kunlaboraj kontraktoj

La 18an de septembro en sia reta kunsido la Komitato de UEA akceptis la proponon de la Estraro de UEA pri komisiado de la libroservo de UEA kaj de la kongresa administrado de UEA al la asocio E@I (Slovakio). Legu plie ĉe:

<https://sezonoj.ru/2021/09/uea-88/>

Ne temas pri transdono sed kontraktado de servoj. La Libroservo kaj la Universalaj Kongresoj restas propraj de UEA.

Rezultoj el la nova agado de la Eŭropa Komisiono

Mesaĝis membro de la eŭropa komisiono de UEA, el kiu vi povas kompreni, ke la agado por atentigi pri Esperanto en la kadro de la tiel nomata "konferenco pri la estonteco de Eŭropo" komencas efiki. Oni almenaŭ debatos pri ĝi. Dankon al ĉiuj membroj, kiuj partoprenis la agadon, kaj inviton al la aliaj legi ĉi tiun paĝon:

https://uea.org/vikio/Konferenco_pri_la_estonteco_de_E%C5%ADropo .

AMO 76 kaj ILEI inde prezentitaj

La oktobra numero de la revuo *Esperanto* dediĉis tri paĝojn al ampleksa artikolo de Ahmad Mamduhi el Irano, la nova prezidanto de ILEI. Ĝi prezentas detale la okazintajn programerojn de AMO 76, aliajn erojn el la virtuala kongreso de ILEI (VEKI 2), kaj la plenan liston de la novaj estraranoj, kune kun la taskdividoj. Tio aperis plie en unupaĝa ilustrita prezento en EKO 36, paĝo 2. Petebla de la redakcio de EKO kiel aparta PDF.

Subtemoj por AMO 80

La lasta kunveno de UTE en Togolando elektis subtemojn pridiskutotajn dum tiu seminario, kiu okazos inter la 23a kaj 26a de decembro 2021. Tio montras

admirindan progreson en la frua komunikado de detaloj, kiuj ne okazas por tro da seminarioj tra la lastaj tempoj. Jen la deciditaj sub-temoj al la ĉeftemo 'Esperanto per io, io per Esperanto':

- Aplikado de Esperanto en ĉiutaga vivo,
- Kial lerni Esperanton?
- Vojoj al sukceso
- Valoraĵoj kulturaj niaj
- Esperanto-organizaĵoj (UEA, ILEI, IKEF, SAT, UMEA kaj pliaj)
- Diskuto-rondo: La bulonja deklaro.

La seminario estas ne nur togolanda sed tutafrika, ne nur tiel sed tutmonda. Ĉiu estas invitata partopreni/kontribui. Pro kovimo, ni ne povas venigi homojn de malproksime al Togolando. Tamen, esperantistojn el landoj najbaraj de Togolando ni bonvenigas. La kostojn pri vojaĝo al Togolando kaj restado/manĝado dum la seminarioj tagoj kovros la seminario. Interesiĝantoj rapide anoncu sin al ACE ĉe <afrikacentro@hotmail.com> kun kopio al <esp.togo@gmail.com>

GBEGLO Koffi

Kampanjo por Tutmonda Arbo-Plantado (TAP)

Malfermiĝo: Septembro 2020. Fermiĝo: la 24-an de oktobro 2030 (datreveno de UN) Celo: 1000 arboj plantitaj ĝis 2030 / po 100 arboj jare. Kiel partopreni: vi povas planti aŭ plantigi arbon en via loĝregiono aŭ okaze de iu evento; sendu fotojn kaj informojn de tiu agado al EKO, ankaŭ al Fernando Maia Jr. (fmaiajr@gmail.com), Normand Fleury (normandfleury@gmail.com) kaj al la redakcio de la revuo *Esperanto* (redakcio@revuoesperanto.org), kiu povos publikigi la progreson.

Ĉu iu estonta AMO-seminario ne povus planti arbon?

===== vortoj: 685 =====



Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.